

SCIENCA REVUO de Internacia Scienca Asocio Esperantista (BEOGRAD, Jugoslavio)	El Vol. 21  n-ro 4/5 (84/85)  5. 9. 1970.
---	---

## LA SLAVAJ LINGVOJ KAJ LA SLAVA SKRIBO

A. D. Atanasov (Sofio, Bulgario)

La slavaj lingvoj estas branĉo de la **hindroeŭropa lingva familio**. \*) Inter la lingvoj, kiuj formiĝis plue el la komuna **hindoeŭropa pralingvo**, granda proksimeco estis komence inter la lingvoj de la slavaj kaj de la baltaj gentoj: iliaj lingvoj estas konataj kiel **baltoslava lingva unueco**. La balta parto de tiu ĉi unueco entenas la formortintan malnovprusan kaj la nun ankoraŭ vivantaj litovan kaj latvan (letonan) lingvojn. Ankoraŭ nun ekzistas komunaj karakteraj elementoj en la slavaj kaj baltaj lingvoj, en la sferoj de fonetiko, formologio, sintakso kaj leksiko.

Ĉirkaŭ 3500—2500 j. antaŭ nia erao la slavaj gentoj loĝis la teritorion nordoriente kaj nordokcidente de la Karpataj montaroj; nordaj najbaroj estis litovoj kaj finnoj, okcidentaj — keltoj kaj germanoj, sudorientaj — scitoj kaj sarmatoj, sudokcidentaj — tracoj. En tiu regiono formiĝis la komuna slava pralingvo sur la bazo de la komuna h. e. pralingvo.

Pli malfrue ekestis vastiĝo de la slavaj gentoj en sudan kaj orientan direktojn.

\*) La termino **hindoeŭropa** (h.—e.) esprimas la geografian vastecon de tiu ĉi lingva familio, konsidere al la du randaj punktoj: en oriento — Hindio, en okcidento — Eŭropo. Germanaj lingvistoj uzas prefere terminon **hindo-germana**, emfazante, ke la okcidenta ekstrema rando estas Britlando — teritorio de la germana branĉo. Iuj uzas ankaŭ la nomon **ariaj** lingvoj, sed sub tiu ĉi termino oni komprenas nur la hindo-iranan grupon.

Sendube, jam en la komence loĝata teritorio en la komuna slava pralingvo formiĝis ĝermoj de dialektoj, kiuj pli malfrue evoluis al apartaj slavaj naciaj lingvoj. Tamen la dialektaj diferencetoj (precipe fonetikaj) ne povis malhelpi la interkompreniĝon de la gentoj, parolantaj la pralingvon, kiuj en tre longa periodo konservis facilan eblecon komuniki inter si. Tiu ĉi cirkonstanco ĝuste permesis, ke ankoraŭ en la IX-a jarcento la fratoj Kirilo (Cirilo) kaj Metodo, kiuj parolis la dialekton de slavaj gentoj ĉirkaŭ Saloniko\*), entreprenis misian veturon en Moravion, por tie prediki la Kristanisman en slava lingvo kaj enkonduki slavlingvan diservon en la moraviajn preĝejojn.

Per la metodoj de la kompara lingvoscienco oni povis restarigi la fizionomion de la komuna slava pralingvo. En tio grave helpis ankaŭ la supremenciita proksimeco inter la slavaj kaj la baltaj lingvoj, konsidere ke la lastaj konservis eĉ ĝis nun multajn karakterajn trajtojn el la periodo de la apartiĝo en la komuna hindoeŭropa pralingvo. Laŭ aserto de la bulgara sciencisto Vladimir I. Georgiev, la morfologio de la litova lingvo estas preskaŭ identa kun la morfologio de la praslava; la litova fonetiko kaj morfologio povus iagrade anstataŭi la (skribe) neatestian praslavan lingvon\*\*).

La envenintaj en la slavan pralingvon ŝanĝoj, kiuj diferencigas ĝin disde la patrina h.-e. lingvo kaj do difinas ankaŭ iujn diferencojn inter ĝi kaj ceteraj h.-e. lingvoj, evoluintaj laŭ apartaj propraj vojoj, rilatas la fonetikon kaj sekve ankaŭ la morfologion.

Rilate la fonetikon, ne intencante prezenti ĉi tie plenan bildon de ĉiuj fonemoj, ni kontentiĝos doni nur kelkajn karakterizajn ekzemplojn pri la devioj.\*) Por la celo mi komparos fonemojn de la komuna h.-e. pralingvo kun la devenintaj de ili fonemoj en la slavaj kaj en la latinidaj lingvoj, reprezentataj de la latina, kaj ankaŭ en la sanskrito (kiu estas plej proksima al la hindoeŭropa).

\*) La norda parto de kiuj fariĝis la bazo de la formiĝinta bulgara nacio.

\*) V. I. Georgiev, *Issledovanja po sravniteljno-istoričeskomu jazokoznaniju*, Moskva, 1958, pĝ. 221, 235.

\*) Detale pri tio oni povus legi en la verko de la rusa lingvisto Grigorij A. Iljinskij, *Praslavjanskaja gramatika* (Praslava gramatiko), Neĵin, 1916, pĝ. 45—192. Tabele la korelativo inter h.-e. kaj slavaj fonemoj estas prezentita en la verko de la franca lingvisto André Vaillant »Grammaire comparée des langues slaves« (Kompara gramatiko de la slavaj lingvoj), vol. I, pĝ. 24 (Konsonantoj) kaj pĝ. 106 (vokaloj). Speciale pri la konsonantoj ankaŭ plenan tabelon de la hindoeŭropaj kaj iliaj respondaĵoj kaj iliaj respondaĵoj en la devenintaj lingvoj enhavas la granda *Dictionary of the English language*, eld. de The American Heritage Publishing Co. Inc. kaj Houghton Mifflin Company, Boston, New York k.a., 1970.

## EL LA VOKALOJ

Hindo-eŭropa	Sanskrita	Slava	Latina
<u>a</u>	<u>a</u>	<u>o</u>	<u>a</u>
* ak's <sup>1)</sup>	ākṣa-s	os (b) malnovbulg., rusa)	axis
* mar-	maryada (marbordo)	more (bulg. k.a.)	mare
<u>o</u> (el <u>a</u> )	<u>a</u>	<u>a</u>	<u>o</u>
* do-	da'nam	dar (bulg.)	donum
* g'no-	jnanati	znati (malnovbulg.)	(co) gnosco
<u>o</u>	<u>a</u>	<u>o</u>	<u>o(u)</u>
* dom-	dāma-s	dom (bulg.k.a.)	domus
* ok' (t)	asta (u)	os (e) m (bulg.) osm (ĉeĥa)	octo
<u>u</u>	<u>u</u>	y	u
* mus-	mus	mъśb (rusa)	mus
* bhu-	bhutiś	bytie (rusa)	fui

## EL LA KONSONANTOJ

Hindo-eŭropa	Sanskrita	Slava	Latina
<u>bh</u>	<u>bh</u>	<u>b</u>	<u>f</u>
* bhrate (r)	bhratar	brat (bulg.)	
* bher-	bharati	brat (ĉ) (ĉeĥa) bera (bulg.)	frater fero
<u>dh</u>	<u>dh</u>	<u>d</u>	<u>f</u>
* dhumos	dhuma	dym (rusa)	fumus
* dhe-	dadhati	déti (ĉeĥa)	facio, feci

**Rimarko.** La vortoj en la kolumno »slava« estas prenitaj el diversaj slavaj lingvoj.

La slava pralingvo estis **sintetika**. Ĝia morfologio karakteriziĝas per jenaj trajtoj:

La **nomoj** havis tri genrojn (maskulino, feminino kaj neŭtro), tri **nombrojn** (singularo, dualo kaj pluralo), sep **kazojn** (nominativo, genitivo, dativo, akuzativo, instrumentalo, lokativo kaj vokativo).

La **verboj** dividiĝas en kvin konjugaciojn. Ĉiu verbo havis du bazojn: **prezencan** kaj **infinitivan**. La preterito manifestiĝis en kvar tempoj: aoristo, imperfekto, perfekto kaj pluskvamperfekto. La **modoj** estis kvin: indikativo, imperativo (volitivo), kondicionalo, inflinitivo kaj supino.

<sup>1)</sup> Per steleto (asterisko) estas signataj pralingvaj vortoj, restarigitaj laŭ teoria (spekulativa) vojo, sed neatestitaj en skribaĵo.

Du fundamentaj tendencoj influis la evoluon de la praslava lingvo kaj estigis ŝanĝojn, kiuj karakterizas la apartiĝintajn slavajn lingvojn: strebo al plikreskanta vokaleco kaj strebo al palataligo. Sekve de ilia efiko stabiligis malfermitaj silaboj, diftongoj transiris en monoftongojn (h.—e. *ei* = slava *i*; *oi*, *ai*, *i* = slava *ê* (b); *eu*, *ou*, *au*, *əu* = slava *əu*), elkreskis sonantaj *r* kaj *l* (silaboformantaj), same nazaloj (*e<sup>n</sup>*, kaj *o<sup>n</sup>*) iuj konsonantaj grupoj simpligis prononce k. a.

Inter la fonetikaj karakterizaĵoj de la praslava lingvo meritas menciion la sekvaj fonemoj:

*ea* — »jat«,; *ĝi* transiris en la malnovbulgaran lingvon kiel *ĥ* (en latinlitera transskribo signata per *e*): en la plimulto de la slavaj *ĝi* transiris al *e* (aŭ *ie*, *ije*), en la ukraina kiel *i*, kaj en la nuntempa bulgara lingvo konservis sian malnovan sonadon: en la dialekto de la Rodopimontaro kiel *ea*, en la orientaj dialektoj kaj kiel *ja*, kaj kiel *e* — depende de la pozicio de tiu ĉi fonemo, nur en okcidentaj dialektoj nur *e*.

La du »mallumaj« vokaloj (*ѣ* — granda »jer«, *ѝ* — malgranda »jer«, en latinlitera transskribo signataj ordinaro per la originaj literoj *ѣ* kaj *ѝ* sed por *ѣ* estas uzata ankaŭ signo  $\Lambda$ , ŭ aŭ  $u^{\wedge}$ ), konservitaj en la malnovbulgara kaj parte en la nuntempa bulgara lingvo.

La du nazaloj  $\overset{\nabla}{m}$  (granda »jus«) kaj  $\overset{\nabla}{n}$  (malgranda »jus«), konservitaj en la malnovbulgara lingvo (kun sonado *o<sup>n</sup>* kaj *e<sup>n</sup>*, en latina transskribo signataj per *o* kaj *e*).

Interesa estas la evoluo de la hindoeŭropaj grupoj *or*, *er*, *ol*, *el*, kiuj en la plua evoluo de slavaj lingvoj spertis metatezon (la vokalo venis post la konsonanto), sed en la rusa lingvo la modifo esprimiĝis per la t.n. »plenvokaleco« (aŭ »plenvokalismo« — ruse: polnoglasie), pri kio ni donos ekzemplojn ĉe la karakterizo de la rusa lingvo.

La teritoria vastiĝo de la slavaj gentoj fortiĝis post la fino de la granda migrado de popoloj kaj atingis okcidente trans Elbo, ankaŭ la linion Hanovro-Ratisbono, kaj la linion Linzo ĝis Triesto, etendiĝante de la Baltika ĝis la Adriatika maroj, sude — inter la Adriatika kaj Nigra maroj, ĝis la centra parto de Peloponezo.

Sur la historian scenejon LA SLAVOJ aperas ĉirkaŭ la VI jc. de nia erao. Ili estis en kontakto kun du grandaj regnoj: la Franka kaj la Bizanca. La hungara invado (en la fino de la IX jc.) disigis la nordajn disde la sudaj slavo. Ĉe la novaj kondiĉoj ekformiĝis la apartaj slavaj lingvoj, kiuj formis tri grupojn: suda, okcidenta kaj orienta. Al la suda apartenas: la bulgara, la serbo-kroata, la slovena kaj la formiĝanta lastatempe makedona (el sud-okcidentaj dialektoj); al la okcidenta: la pola (kun la kaŝuba dialekto), la ĉeĥa, la slovaka kaj la luĵika, al la orienta: la rusa, la ukraina kaj la belorusa. Ĉiu el tiuj ĉi lingvoj evoluis plu sub diversaj influoj kaj la diferencoj inter ili pliiĝis.

La praslavaj palataligitaj konsonantoj *t* kaj *d* (grupoj \**tj* kaj \**dj*) transiris en la apartaj slavaj lingvoj jene: en la suda grupo — en la bulgara ŝt

kaj *ĵd*, en la serbo -kroata ĉ kaj *đ (ô)*, en la slovena ĉ kaj *j*; en la okcidenta grupo *c* kaj *dz*, en la orienta grupo ĉ kaj *ĵ* Ekzemploj:

\* **svetja**: bulg. *svešt* (maked. *svešča*), serbo-kroata *svijeća*, slovena *sveča*, pola *święca*, ĉeĥa *svice*, luĵ. *sweca*, rusa *sveča*.

**medja**: bulg. *meĵda* (kaj adverbo *meĵdu*, en makedona *megju*), serbo-kr. *međa*, slovena *meja*, pola *miedza*, ĉeĥ. *meze*, luĵ. *mêza*, rusa *meja*.

La akcento en la hindoeŭropa pralingvo estis muzika (kromata); ĝi transiris ankaŭ en la slavan pralingvon, sed konserviĝis plu nur en la nunaj serbo-kroata kaj slovena lingvoj; en la ceterj slavaj lingvoj, post ilia apartiĝo disde la pralingvo, establiĝis **dinamika** akcento.

\* \* \*

**Slavlingva literaturo** naskiĝis en la IX jc. de nia erao en la **malnovslava lingvo** (nomata de iuj aŭtoroj ankaŭ »malnovbulgara«, de aliaj »eklezi-slava«), kiu stabiliĝis en la verkoj de la fratoj Kirilo (Konstantino Filozofa) kaj Metodo. La malkonkordaj rilatoj inter Romo (la katoliika eklezio) kaj Bizanco (la orient-ortodoksa eklezio) efikis konfuze sur la kristaniĝintajn slavajn gentojn en la teritorioj ĉirkaŭ la dislimiga regiono. Rostislavo, princo de la slava ŝtato Moravio, deziris, ke en lia lando la kristanismo estu predikata en slava lingvo, komprenata de la popolo, sed la germana katolika pastro obstinis fari la diservon en latina lingvo. Rostislav turnis sin al Bizanco kun peto, ke oni sendu en Moravion kapablajn misiistojn, kiuj faros la diservon en slava lingvo. Responde al tio la Bizanca imperiestro komisiis la taskon al la du fratoj, jam distingiĝintaj per sukcesa plenumo de tiaspecaj misioj. Ĉar ĝis tiam la slavoj havis nek propran skribon, nek librojn, la du fratoj ellaboris unue specialan alfabeton, konforman al la slava fonetiko, kaj poste tradukis la necesajn por diservo ekleziajn librojn. Ili mem parolis, kiel jam dirite, la slavan dialekton de Saloniko kaj ĝiaj ĉirkaŭaĵoj, kaj tiu ĉi dialekto donis la bazon de la unua slava literatura lingvo — la malnovslava.\*) Tiu ĉi lingvo, jam fiksita skribe, havas grandegan signifon por la slavistiko; ĝia signifo povus esti komparata preskaŭ kun la signifo de la sanskrito por rivero de la esenco de la h.—e. pralingvo, kaj kun la signifo de la latino por la romia filologio. Ĝi estis plej proksima al la slava pralingvo kaj heredis ties

\*) La nomo »bulgara« venis el la nomo de neslava (sed tjurka) gento, kiu en la lastaj jardekoj de la VII jc. de nia erao transiris Danubon, establiĝis en la teritorio inter tiu ĉi rivero, la Nigra Maro kaj la Balkana Montaro, kaj fondis (680) novan ŝtaton, en kiu ĝi estis komence la regenta klaso, sed post nelonga periodo asimiliĝis en la slava plimulto kaj lasis nur sian nomon al la ŝtato kaj al ĝia slava loĝantaro. La politiko de la ŝtato estis strebo al unuigo de la tuta sam-etna loĝantaro en la teritorio ĝis la Egea kaj la Adriatika maroj en unu homogenan regionon. Komence la lingvon de tiu ĉi slava popolo oni nomis ankoraŭ ne bulgara, sed slava — językB slovenskiB.

ĉefajn karakterajn trajtojn en la fonemaro kaj en la morfologio: la vokalojn (»jat«), la du »jer-ojn«- Ѣ kaj ѣ la proksiman al ili »jeri« — ѣ (nuntempe rusa ѣ, pola y), signata transskribe per y, la du »jus-ojn« .La konsonantgrupoj **tj** kaj **dj** en la lingvo de la priparolata literaturo aperas kiel **št** kaj **žd** (trajto karaktera en la nuna bulgara lingvo). En la morfologio la malnovslava lingvo de fratoj Kirilo kaj Metodo kaj de iliaj disĉiploj konservis la deklinacian sistemon kaj la riĉan konjugacian sistemon de la komuna slava pralingvo.

La literaturo, kreita en la malnovslava lingvo, kaj la lingvo mem, disvastiĝis siatempe en la slavan mondon kaj grave influis la evoluon de apartaj slavaj lingvoj.

\*  
\*            \*  
\*

Post la ĝeneralaj informoj pri la esenco de la slava pralingvo kaj ĝia evoluo al disbranĉiĝo en tri grupojn, mi provos doni koncize ideon pri la esencaj trajtoj de la apartaj slavaj lingvoj en la nuna tempo.

## S U D A   G R U P O

**BULGARA LINGVO.** Disvolviĝis el la malnovbulgara, heredis karakterajn fonemojn el ĝi: ê (ѣ), elparolata en la orientaj dialektoj kaj en la literatura lingvo jen kiel **ja**, jen kiel **e**, depende de la pozicio: **ja**, se ĝi estas sub akcento kaj post ĝi ne sekvas mola silabo (aŭ mola konsonanto), e — se mankas tiuj ĉi kondiĉoj; sekve **mlêko** (lakto) — elparolu **mljáko** (sing.), sed **mle-ká** (plur.); **golêm** (granda) — elparolu **goljám** (sing.), sed **golémi** (plur.). Plue: konservita estas la vokalo »jer« (ѣ) kaj ankaŭ la konsonantaj grupoj **št** kaj **žd** anstataŭ la praslavaj **tj** kaj **dj**. En la substantivoj kaj la adjektivoj la bulgara lingvo transiris al **analitika esprimo** de la kazoj **per prepozicioj**. Tio fundamente distingas ĝin dis de la ceteraj slavaj lingvoj. Nur la vokativo restis. En la personaj pronomoj tamen restis la formoj de akuzativa kaj dativa kazoj. En la verboj ĝi konservis riĉan konjugacian sistemon, nur la infinitivo forfalis kaj esprimiĝas analitike per la partikulo **da** plus prezenco. Apartaĵo, kiu diferencigas la bulgaran lingvon disde la ceteraj slavaj lingvoj, estas la »rerakonta« (aŭ transinforma) preterito (minalo preizkazno vreme), kiu esprimas informon pri fakto ne senpere vidita aŭ spertita, sed eksciita el diroj de aliaj personoj. El la participoj restis vivantaj la preteritaj — aktiva kaj pasiva; prezenca participo estas malofte uzata, pleje en literatura lingvaĵo, pro influo de la rusa lingvo. Sole la bulgara el ĉiuj slavaj lingvoj posedas **difinan artikolon**; ĝi estas postpozitiva kaj kunigita kun la nomo. La akcento varias. Alfabeto kirila.

**SERBO—KROATA LINGVO.** Komuna nacia lingvo de serboj, kroatoj, montenegranoj kaj bosnianoj. La praslavaj grupoj **dj** kaj **tj** transiris en **d** (**đ**) kaj **ć** (**č**). La malnova deklinacia sistemo kun sep kazoj estas konservita. En la verboj estas konservitaj ĉiuj malnovaj tempoj de la preterito, same la infinitivo. La futuro formiĝas el la helpverbo **ću** plus infinitivo. La akcento estas muzika, kvarspeca: longa — ascenda kaj descenda, mallonga — ascenda kaj descenda. La loko de la akcento ne estas fiksita. La ortografio estas fonetika. Estas uzataj du alfabetoj: kirila (serboj) kaj latina (kroatoj); la lasta adaptita per diakritaj signoj al la fonetiko de la lingvo.

**SLOVENA LINGVO**, parolata de ne pli ol 1,6 milionoj da slavoj, dividiĝas en sep dialektoj. Disvolviĝis sur la bazo de la centra »Dolena« dialekto, kun influo de elementoj el la ceteraj dialektoj. Estas konservitaj multaj malnovaj gramtikaj formoj. El la deklinacio malaperis le vokativo. En la konjugacia sistemo konserviĝis la supino. La akcento estas muzika, trispeca: mallonga, longa ascenda kaj longa descenda; ĝia loko ne estas fiksita. Ortografio modere fonetika. Alfabeto latina, adaptita al la fonetiko de la lingvo.

**MAKEDONA LINGVO.** Formiĝis, lige kun ekestintaj histori-politikaj cirkonstancoj, sur la bazo de tri sud-okcidentaj dialektoj de la malnovslava lingvo. Oficialan agnoskon ĝi ricevis nur lasttempe, kiel aparta ŝtata kaj literatura lingvo de la kreita Makedona Respubliko. Posedas simile al la bulgara lingvo: sama konjugacia sistemo kun analitika futuro (partikulo **ke** plus prezenco de la verbo), deklinacio analitika, difina artikolo (trispeca). La historia disvolviĝo de la elvena dialekta bazo enteniĝas en ĝiaj apartaĵoj (pli forta moligo de iuj konsonantoj, trispeca difina artikolo, kelkaj specifaj parolturkoj k. a.) Alfabeto kirila.

## OKCIDENTA GRUPO

**POLA LINGVO** (kun la Kaŝuba dialekto). En la fonetiko estas konservitaj la nazaloj **o**, (signata per **a**,) kaj **e**. Ankaŭ la malnova »jeri« (skribata **y**). La konsonantoj estas malmolaj kaj molaj. La moleco ĉe iuj pozicioj venas ĝis fundamenta ŝanĝo de la fonemo: la vorto **telo** (bulg. **tjáló**) fariĝas **cialo**: **pisat** — **pisać**. Palataligita **d** fariĝas **dz**, palataligita **r** — **rz**: kontraŭ ceterslava **diven** — pola **dziwny**, kontraŭ **reka** — **rzeka**. En la orienta parto de la polingva teritorio **ĵ**, **ĉ**, **ŝ** estas prononcataj **z**, **c**, **s** (tiel nomata »mazurismo«). La lingvo sintetika, ĝi konservis la deklinacian sistemon. La konjugacia sistemo estas simpligiita, la aoristo kaj la imperfekto malaperis. La akcento estas fiksita sur la antaŭlasta silabo. Alfabeto latina, adaptita al la pola fonetiko.

**CEĤA LINGVO.** El la malnovaj fonemoj perdiĝis la nazaloj. Estas longaj kaj mallongaj vokaloj. La sonantoj **r**, **l**, **m** estas silaboformaj (funkcias vokale). Post palatala konsonanto la vokalo **a** transiras en **e**, le vokalo **u** — en **i**; palataligita **r**, transiras en **ɛ** (en pola lingvo **rz**); la guturala **g** transiris en **h**

(grad — hrad, gavran — havran. En la deklinacio konserviĝis 7 kazoj. En la konjugacio malaperis la aoristo kaj la imperfekto. La akcento estas fiksita sur la unua silabo. Alfabeto latina, adaptita al la ĉeĥa fonetiko.

**SLOVAKA LINGVO.** Tre proksima al la ĉeĥa, kun iuj fonetikaj diferencoj, kelkaj leksikaj kaj ankaŭ tiaj en la sistemo de vortfarado. Longaj kaj mallongaj vokaloj, deklinacio, malesto de aoristo kaj imperfekto en la konjugacio — kiel en la ĉeĥa. La akcento same sur la unua silabo. El la tri dialektoj la meza estas bazo de la literatura lingvo, la orienta proksimiĝas per iuj trajtoj al la pola kaj la ukraina. Alfabeto latina, adaptita.

**LUJIKAJ LINGVOJ** — »supra« kaj »malsupra«, parolataj de **sorboj** aŭ **luĵikaj serboj** — slav-etna minoritato (ĉirkaŭ 100.000 personoj) en la teritorio de Orienta Germanio. La loĝantaro estas dulingva — parolas la germanan kaj sian slav-luĵikan lingvojn. La supra luĵika estas proksima al la ĉeĥa per iuj trajtoj, interalie per akcento sur la unua silabo; la malsupra — al la pola, kun akcento sur la antaŭlasta silabo. Morfologie konservis arkaikajn elementojn, en la verba sistemo — la aoriston kaj la imperfekton, ankaŭ dualon. Por la slavistiko tiu ĉi lingvo havas apartan signifon. La leksiko estas forte influita de la germana lingvo.

## ORIENTA GRUPO

**RUSA LINGVO**, parolata de la plej multenombra slava popolo. Karakteraj trajtoj en la fonetiko estas: la praslavaj grupoj **dj** kaj **tj** aperas kiel **ĵ** kaj **ĉ**; la vokaloj **a** kaj **e** en senakcenta pozicio reduktiĝas al **aj** kaj **i**; la vokalo **o** de la ceteraj slavaj lingvoj, kvankam skribata **o**, en neakcentata pozicio elparoliĝas **a**.\* La vokalo **e** sub akcento en iuj okazoj prononciĝas **jo** (signata ofte en la rusa ortografio per **ѣ**): **dalĉkij**—malproksima, sed la adverbo estas **daleko** (ĉi tie **e** ne estas sub akcento). (Estas tamen pluraj esceptoj: **nadĉjda** — espero, sed la adjektivo estas **nadĉjdnyj**, **lĉd** — glacio, sed **lĉdnyk** — glacienejo, k. a.).

Kiel ni jam menciis, karaktera fenomeno en la rusa lingvo estas la »plen-vokaleco« (pologlasie): la arkaikaj grupoj **or**, **er**, **ol**, **el** (kun sonantaj **r** kaj **l** antaŭ konsonanto), transirintaj en la praslavan en **ar**, **er**, **al**, **el**, transiris en la rusan **oro**, **ere**, **olo**, **ele**, dum en la malnovbulgaran lingvon en **ra**, **re**, **la**, **le**.

\*) Ĝis antaŭnelonge la lingvistoj ĝenerale taksis tiun ĉi elparolon kiel reduktion de **o**. Lastatempe tamen aperis tezo, ke ĝi estas dekomenca elparolo sed ne sekvo de reduktion. Pri tio pli detale en la studoj de V. I. Georgiev, V. K. Juravljov, F.P. Filin kaj S. J. Stojkov en la libro »Obŝĉeslavjanskoe znaĉenie problemy aknaja« (La komuniava signifo de la problemo de la »a-umado«), Sofio, 1968.

Same en la libro de V. I. Georgiev »Vokalnata sistema v razvoja na slavjanskite ezici« (La vokala sistemo en la evoluo de la slavaj lingvoj), Sofio, 1964.



Ekzemple:				
Praslava	Malnovslava	Pola	Ceĥa	Rusa
* gard (Г)	grad (Г)	grod <sup>1)</sup>	hrad	gorod <sup>2)</sup>
* galva	glava	gtowa	hlava	golova <sup>2)</sup>
* berg (Б) <sup>3)</sup>	breg (Б)	brzeg	breh	bereg <sup>2)</sup>
* melko <sup>4)</sup>	mléko	mleko	mléko	moloko <sup>2)</sup>

La rusa lingvo estas sintetika. Konservis la malnovajn kazojn, sed la verban sistemon simpligis multe. La preterito aperas en formo de preterita aktiva participo, sen helpverbo: ja ĉítal — mi legis, ona ĉitala — ŝi legis. La akcento ne estas fiksita. Alfabeto kirila.

**UKRAINA LINGVO** (en la pasinteco nomata »malgrandrusa« — maloruskij). Proksima laŭ strukturo al la rusa, sed en la fonetiko estas gravaj distingaĵoj: la neakcentitaj vokaloj ne reduktiĝas; la arkaika *ê* transiris en *i*: kontraŭ rusa *hleb*, bulg. *hljab* — urk. *hlib*; rusa *télo*, bulg. *tjálo* — ukr. *tilo* ktp.; vokala alternado (gradigo): *o* — *i* (*viz* — *voza*) kaj *e* — *i* (*lid* — *ledu*). La konsonantoj ne palataliĝas en pozicio antaŭ *e* kaj *i*. La konjugacio estas kiel la rusa, sed fonetike en la preterita participo la rusa finaĵo *l* (en maskulino) aperas en la ukraina *v*: mask. *hodiv*, *pisav*, feminina *hodila*, *pisala*. Akcento kiel en la rusa lingvo. Alfabeto kirila, sed kun specifaj ukrainaj literoj *i*, *ï*, *e*.

**BELORUSA LINGVO** strukture estas tre proksima al la rusa. Diferencoj estas ĉefe en la fonetiko: *d* antaŭ *e* kaj *i* elparoliĝas kiel *dz*, *t* — kiel *c* (rus. *deti*, belorus. *dzeci*); *l* transiras en *ŭ* (rus. *volk* = lupo, belorus. *voŭk*). La rusa vokalo *o* en neakcentita pozicio estas ne nur elparolata, sed ankaŭ skribata fonetike *a*: rus. elp. *vadá*, belorus. parole kaj skribe *vadá*, same rus. *odin* (elp. *adin*), belorus, *adzin*.

\*  
\* \* \*

Nun kelkaj vortoj pri la slava skribo.

Ni jam vidis ĉe kiaj cirkonstancoj la fratoj Kirilo kaj Metodo kreis la unuan slavan alfabeton. Ĝi havas nomon *glagolica* kaj similas aspekte nek la grekan, nek la latinan. Tio ĉi donis motivon al la cejlona esperantisto Njanasatta Thero demndi ĉu ellaborante ĝin la kreintoj ne serĉis modelon en iu el la alfabetoj de la aziaj lingvoj. Komparinte la literojn de la *glagolica* kun la literoj de la diritaj alfabetoj (specimenojn de kiuj la demandinto sendis), ni ne malkovris similecon. Aliparte, la du fratoj ne bezonis modelon — por ili tiam estis problemo krei alfabeton, kiu simulu nek la grekan (ĉar ili ja iris prediki slavlingve en regiono, troviĝanta en la sfero de la Roma eklezio, kaj ne estis prudente lasi impreson, ke la misio bazas sin sur la rivala greka eklezio), nek la latinan (por ne inciti la Bizancan ortodoksan eklezion). La plej uzataj elementoj en la desegnado de la novaj literoj estis kruco, triangulo kaj cirklo — tri simbolaj figuroj por la kristanismo. En tiu ĉi alfabeto estis skribitaj la unuaj slavlingvaj libroj. Sed post kelka tempo estis kreita alia alfabeto, pli facila kaj simpla ol la *glagolica*; ĝi estas nomata *kirilica* kaj ĝian ella-

1) Elparolu: *grud*, *górad* *galavá*, *béreg*, *malakó*.

3) Komparu la germ. »Berg«;

4) Komparu la germ. *Milch*, *melken*.

boron oni atribuas al Kliment Oĥridski, disĉiplo de la du fratoj; supozeble oni donis al ĝi la nomon honore al la granda kleriganto kaj majstro de la slava kulturo Kirilo. La kirilica populariĝis kaj vastiĝis, kaj la glagolica estis forlasita (nur en Kroatio oni daŭrigis ĝian uzadon ĝis malfrua tempo).

Jen modeloj de du alfabetoj

#### GLAGOLICA:

ѠѢ ѦѧѨѩѪѫѬѭѮѯѰѱѲѳѴѵѶѷѸѹѺѻѼѽѾѿѰѱѲѳѴѵѶѷѸѹѺѻѼѽѾѿ

#### KIRILICA:

Nuntempa kirila alfabeto: ВѢ началѣ бѣ слово . . .

(Vĉ načalĉ bĉ slovo — En la komenco estis la vorto — el la evangelio de Johano).

En kirilica estas skribitaj plej multaj verkoj de la malnova literaturo de la slavaj popoloj. Ĝin uzis ankaŭ la rumanoj tre longan tempon. En 1708 la rusa imperiestro Petro i ordonis stiligi ĝin aspekte laŭ modelo de la jam stabiligitaj en la Okcidenta Eŭropo latinaj preslitteroj, kaj tiel establiĝis la **civitana literaro** de la kirila alfabeto, kiu nun estas uzata en la slavaj lingvoj rusa, bulgara, serba, ukraina, belorusa, makedona, kaj ankaŭ en la lingvoj de neslavaj popoloj — kazaha, mongola, azerbejĝana k. a., por kies fonetiko la kirila alfabeto estas taŭge adaptebla.

Laŭ la nun havataj statistikaj donitaĵoj la nombro de la loĝantaro, parolanta slavajn lingvojn sur la tero, estas ĉirkaŭ 250 milionoj. La statistiko cetero ne povas enkapti la precizan nombron de la slavoj, loĝantaj en neslavaj landoj, kaj precepe en ekstereŭropaj kontinentoj.

Kiel dirite, ĉiuj el la slavaj lingvoj, apartiĝinte disde la komuna lingvo-patrino, evoluis memstare, spertante diversajn influojn. Kreiĝis diferencoj, kiuj por iuj el la slavaj popoloj ne prezentas gravan obstaklon por relative facila kompreniĝo kun aliaj parencaj popoloj, sed inter anoj de la orienta kaj la suda grupoj unuflanke, kaj aliflanke kun la anoj de la okcidenta grupo, tia kompreniĝo nun ne estas ebla sen speciala lernado de la respektiva lingvo.

#### BIBLIOGRAFIO

Г. А. ИЛИНСКИЙ, Праславянская грамматика

(Praslava Gramatiko), Neĵin, 1916

A. VAILLANT, Grammaire comparée des langues slaves, I-III,

Lyon-Paris, 1950-1958, IV Paris, 1966

В. И. ГЕОРГИЕВ, Исследования по сравнительно-историческому языкознанию (Studoj pri la kompar-historia lingvoscienco), Moskvo, 1958.